

James Yorkston,  
Moliino Malon'

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

1. En bela Dublino,  
Jen vivis knabino,  
Enamiĝis unue en tiun ĉi mi.  
Ĉareton ŝovante  
Tra l' stratoj irante  
Ŝi vokis : Jen konkoj, jen ostroj! Aĉetu vi, ho!  
Ankoraŭ tutfreŝaj, ankoraŭ tutfreŝaj!  
Jen konkoj kaj ostroj! Aĉetu vi, ho!

2. Veturis ŝi tiel  
Tra l' stratoj samkiel  
Ĝin faris antaŭe gepatroj de ŝi.  
Sian ĉaron ŝovante,  
Tra l' stratoj irante  
Vokante : Jen konkoj, jen ostroj! Aĉetu vi, ho!  
Ankoraŭ tutfreŝaj, ankoraŭ tutfreŝaj!  
Jen konkoj kaj ostroj! Aĉetu vi, ho!

3. Ŝi iĝis malsana,  
Sanig' estis vana,  
Memoras mi ĉiam ankoraŭ pri ŝi,  
Tra l' stratoj iranta,  
Ĉareton ŝovanta,  
Vokanta: Jen konkoj, jen ostroj! Aĉetu vi, ho!  
Ankoraŭ tutfreŝaj, ankoraŭ tutfreŝaj!  
Jen konkoj kaj ostroj! Aĉetu vi, ho!

...

*Traduko de la Angla poemo "Molly Malone" de James Yorkston en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2006-12-04.*

*MR-451-2 (Esperanto) / Arg-374-735 (2008-11-29 16:14:27)*